

# **Kajeroj** **el la Sudo**



---

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

---



Nº. 1 \* DECEMBRO 1988



## KAJEROJ EL LA SUDO

Bulteno de Hispana Asocio de  
Laboristoj Esperantistoj (HALE)

Prezidanto:  
Manuel López Hernández

Sekretario:  
Fco. A. Antúnez Romero

Kasisto:  
Tomás Caspe Cereijó

Sidejo:  
Str. Sol, 75  
E-41003 Sevilla (Hispanio)

---

Redaktoroj de la Bulteno:

Antonio Marco Botella  
Av. Compromiso de Caspe, 26, 1ª.  
50002 - Zaragoza (Hispanio)

Miguel Fernández Martín  
Santa Genoveva, 58  
28017 - Madrid (Hispanio)

---

*Korrikolo desegno de Miro.*

---

### ENHAVO :

Saluto kaj prezento	3
Kaj fine HALE ekpaŝas	4
Bonvolu ridi... sed ne tro	6
La malnovaj ŝuaĉoj	7
Nia movado	10
Ni legis por vi	12
Lirikaj paĝoj	14
Pioniroj	16
Dokumentoj el pasinto	18

*Noto:*

*Pri la enhavo de la artikoloj  
respondecas la aŭtoroj mem.*

## SALUTO KAJ PREZENTO

Jen ni antaŭ vi, kompano, amiko, kamarado, amafojne aperas...

Ĉu unu plia bulteno en la panoramo de nia stereotipa gazetaro? Verŝajne jes. Nur unu plia. Nia koro ampleksas universojn, sed, komence, niaj monrimedoj liliputas, kaj nia organizo ne elrampis ankoraŭ el la vindoj. Ĉu grave? Tute ne! Ni posedas, tamen, sufiĉan do-



zon da amo, frenezo kaj aŭdaco por, estante santerpe laboristoj konsciaj pri tiu fakto kaj entuziasmaj esperantistoj, proponi al vi, ke ni kune, pere de ĉi paĝoj, prirevu justoplanan futuron, donkifotu kontraŭ la vampiroj kaj la ĉiopovaj, elversu, krom la tuta poezio de nia animo, nian galon kaj niajn disreviĝojn, spegulon, sume, la farton de la hispana laborista-esperantista movado. Nenio ankoraŭ pri definitiva strukturo. Nenio pri la ofteco ĉi-gazeta. Tion diktos al ni nur viaj

moj, viaj kunlaboraĵoj, la kvanto kaj la forto de la eventoj nin tuŝantaj, viaj bezonoj... Certu, ĉion spite, ke minimume unu fojon jare niaj kajeroj el la sudo flugos viahejmen, distrumpetos sian disdeĝnon al la tenebroj, tamburos sian fidon pri la utopio-la morgaŭa realo- kaj invitos vin kunpaŝi al la regno de la helo kun la sama humilo kaj modesto de niaj laborkostumoj...

Ek do al la plumo, kamaradoj! Nia dua numero jam avidas eloviĝi...

## Kaj fine HALE ekpaŝas

La afero ne estis facila, tute ne, sed ni atingis la celon. Kelkaj hispanaj SAT-anoj, ne multaj, projektis jam antaŭ longe, apenaŭ alvenis al ni la demokratio, fondi laboristan E-asocion en Hispanio, pli-malpli similan al tiuj jam ekzistantaj en aliaj landoj. Sur la fono staris kelkaj LEA-oj kiel modelo. Sed ni trovis survoje seriozajn barojn: unue, okazis provoj en la kataluna regiono, kiuj ne sukcesis... Kaj la projektoj ne sukcesis, ĉar la eventualaj membroj, grand-



parte, bedaŭrinde konfuzis la principojn kaj celojn laboristajn kun certaj aspiroj speciale naciismaj. La fiasko estis ja neevitebla.

Kelkaj konsciaj katalunaj k-doĵ, fidelaj al niaj ideoj kaj sufiĉe inteligentaj por distingi laborismon de naciismo, donis al ni la solvon: "fнду vi mem, ekster Katalunio la asocion, kaj ni, katalunaj SAT-anoj, elkore kaj solidare kunlaboros kun vi en la komuna tasko". Ni plenumis la konsilon, faris la oficialajn demarŝojn kaj post longa atendado la asocio estis finfine oficialigita. Jen do HALE ĉe la sojlo de nia unua etapo.

Historie, ni diru, ke ne estas tiu ĉi la unua asocio de karaktero laborista naskiĝinta en Hispanio. Citindas la socialistaj E-grupoj "Libera Hom", de Madrido (1910), tiu de la Laborista Ateneo de Gijón (1911), la grupoj de Valencio kaj Kordovo, kaj elstare el ili, tiu de Bilbao, ĉerte unu el la plej potencaj kaj aktivaj de Hispanio en la unuaj jardekoj de ĉi jarcento. Ankaŭ de karaktero laborista estis "Tero kaj Libereco" fondita en 1908 de Mauricio F.Eixala en Barcelono, kaj aliaj ne tiel potencaj, kies mencio trolongigus la liston.

Jen, tiurilate, gravaj laboristaj-esperentistaj atingoj de niaj kolegoj per la menciitaj grupoj:

La akcepto fare de la sindikatoj kunvenintaj en Terrassa en 1904 de

propono prezentita de k-do J. Camps, por uzi nur Esperanton en la internaciaj rilatoj inter laboristaj organizoj.

Atentinda evento estis ankaŭ la Dua Sindikatista Kongreso okazinta en Madrido la 14an de Decembro 1919, kie la konvenintaj sindikatoj aprobis inkludi en siaj respektivaj programoj la disvastigon de Esperanto, decidon adoptitan tiuokaze ankaŭ de la Racionalismaj Lernejoj, dependantaj de la sindikatoj (en tiu momento instruantaj en la vesperaj lernejoj pli ol 800.000 lernantojn en la tuta Hispanio). Ni citu ankaŭ la decidon de la Nacia Kongreso de la Socialista Partio en 1928, rekomendintan al la Internacia Socialista Unuiĝo la alprenon de la lingvo Esperanto por la interpartiaj rilatoj en la tuta mondo. Samkongrese oni akceptis la proponon sendi reprezentanton de la Partio al la Internaciaj SAT-Kongresoj, kio efektiviĝis pere de la tiama socialista deputito Francisco Azorin Izquierdo.

Fine, ni menciui la 14an SAT-Kongreson, organizitan en Valencio en 1934 dank'al la streboj de la Laborista E-grupo de tiu urbo, kaj la anarkiismajn grupojn de Barcelono, tre potencajn en la jaroj antaŭaj al la civila milito, kun propraj vaste legitaj gazetoj.

Post tiu rapida rigardo al la historio de la laborista movado, ni devas aldoni kiel informon de niaj lastaj decidoj, ke en la pasinta monato Julio kunvenis en Valencio la hispanaj SAT-anoj, kunvokitaj de la Provizora Komitato de HALE por ekfunkciigi la asocion, kaj decidis:

- a) Elekti Prezidanto k-don Manuel López Hernández, kiu kune kun la SAT-anoj de Seviljo konsistigos la novan estraron de H.A.L.E., kies sidejo estos de nun: str. Sol, 75.- E-41003-SEVILLA.- Hispanio.
- b) Redakti cirkuleron kaj sendi ĝin al ĉiuj hispanaj sindikatoj, proponante starigi E-kursojn en siaj respektivaj sidejoj jam en la komenco de tiu ĉi lernojaro.
- c) Elekti niajn k-dojn Antonio Botella kaj E. Fernández Martín kiel redaktorojn de kreota bulteno, organo de la asocio.
- d) Ĉiuj membroj de SAT en hispanaj teritorioj estas de nun konside-

rataj kiel anoj de H.A.L.E., escepte de tiuj, kiuj skribe ne akceptos ĉi decidon. Ĉiu aŭtonoma hispana teritorio rajtas elekti sian reprezentanton en la estraro.

Pri la karaktero de H.A.L.E. sub diversaj vidpunktoj, post la polemiko pri lingvioj, teritorioj, nacismoj k.t.p., ni preferas prokrasti la komentariojn ĝis venontaj numeroj de nia organo.

Nun ni tute simple anoncas, ke H.A.L.E. vivas kaj jam ekpansas.

Antonio Marco Botella

---

*Bonvolu ridi...  
sed ne tro*

Same kiel post tempesto ĝian kalmas, imitante la Naturon, ni prezentas nun al niaj legantoj spritajn bildojn post serioza temo pritraktita en antaŭa artikolo. Ni nur pretendas, per bonhumoro kaj distro, kompensi niajn k-dojn kaj stimuli ilin al legado de la ankoraŭ restantaj paĝoj.

#### Pri frenezuloj.-

Sinjorino vizitis psikiatron. -Mia edzo, doktoro, ne estas sana. Li lavas la aŭtomobilon ĝintage-

-Tio ne gravas. Mi mem ankaŭ faras tion-

-Jes, doktoro, sed la afero estas ke ni ne havas aŭtomobilon!-

...-...

...-..

...-...

Frenezulo promenas trenante brikon post si ligitan per ŝnuro. Alia promenanto kiu observas tiel strangan konduton diras al li serĉeme: -Kien vi iras kun tiu hundo?-

La frenezulo, tre serioze, respondas: -Ĝu vi ne rimarkas ke tio estas briko?-

-Ha, pardonu!- Sin ekskuzas la scivolema alparolanto.

Kiam la promenanto foriras, la frenezulo diras al la briko:

-Rapide, hundeto! Mi ĵus trompis alian.

## La malnovaj ŝuaĉoj

Ie. Ni jam ne iras en ŝuaĉoj al la laborejoj. La ĉerbumaj kapoj de niaj supermaestroj komprenis ĝustatempe, ke, se oni sukcesus nin turni en konsumantojn, oni trofus du celojn per unu ŝtono, t.e. ni fariĝus duoble ekspluatataj kaj, samtempe, kontente nin ĉisparoksis-me kontentaj pro la fakto, ke ni produktus ne nur por la burĝaro sed ankaŭ por ni mem, akirus saŭan mildon... Kia eltrovo!



Nu, ĉi tiuj domoj ŝtopis sin per elektraĵ maŝinoj, kapablaj plenumi la plej diversajn -jen utilajn, jen vanajn- taskojn, surstrate eksvarmis niaj aŭtomobiloj ĉis plena tohuvaĵo, meze de neelteneblaj fulgo kaj bruego, niaj trotuaroj tapetiĝis per superbaj hundofekajoj -ho, la mirindaj kutinoj de la etburĝoj!-, kaj ni ekŝidis en ŝuldoj ĉis super la ŝultroj, dum la bankieroj frotadis al si la manojn pro ĝojo vendante al ni la duerojn po ses pesetoj. Jen ni, hispanaj laboristoj, kvankam malfrue, alvenis al la ĝuoj de la konsumsocio, la renovigita vizaĝo de la olda kapitalismo, kiu, simile al la birdo fenikso, ne ĉesas esplori novajn rimedojn por renaskiĝi el sia propra ĉindro. Malgraŭ tio, se por la plimulto el la eŭropanoj Majo '68 restis jam iama revo kuŝanta forgeseseje, kaj la floroj de Bob Dylan, Donovan kaj Joan Baez ekŝrumpis sur la frontoj de la eksmodaj hipioj, nialande ĉe la stertorado de la diktaduro, ni, klaskonsciaj laboristoj, konstruadis kastelojn sur glacio kredante ebla profundan socisankon. Forpasis la diktaduro, kaj niaj stratoj pleniĝis de flagoj, niaj plaĉoj de nitin-  
goj, niaj fabrikoj de justaj depostuloj strike esprimitaj, kaj ĉio ĉi kune, ne tiu vilo aŭ tiu alia, veniĝis la demokration. La ĉefaj laboristaj partioj, laŭproprume respublikismaj, suferinte kuriozan memorperdon, akceptis sendiskate la reĝon jam proponitan de la diktaduro. De tiuj kelkaj el ili eĉ daŭre panegiavis al la monarko kaj in-

Censas al la monarkio. Venis pli poste la tempo alivesti sin. Markso kaj Lenino vidiĝis forpelitaj el la socialisma kaj komunisma partioj, respektive. Tiele, la unuaj vendis al ni senkafinan socialismon kaj duaj eŭrokomunisman, strangan produkton, kiu senis grandan konfuzon inter la laboristaro kaj enhavis la ĝemojn de la divido kaj la detruo. Post la komocia pajaĉaĵo de Tejero, kies delnaŭjarcenta bildo ĉirkaŭiris la mondon estigante unu el la plej hontigaj momentoj el nia ĵusa pasinteco, nia politika-socia panoramo neniel diferencis, krom ke nia aĉetpovo ne pliboniĝis rilate al tiu de la plimulto el la Okcident-eŭropaj landoj. Ĉi-kuntekste, nenio baris la vojon de niaj modernaspektaj socialistoj al la povo, des pli, ke nia tuta maldokstrularo, kun naiva fido pri iliaj promesoj rilate al socia ŝanĝo, al la starigo de centoj da miloj da laborpostenoj kaj al nia NATO-eksanigo, montris sin preta baloti por ili. Kaj fine ili venkis, kaj la ŝanĝo ekis. Ili ŝanĝis siajn vestojn: ekuzis ĉemizon kaj kravaton anstataŭ puloveron, kaj komenĉis modernigi nin, modernigi nian industrion, kio postulis la eksigon de miloj da laboristoj -jen vi havas!-, modernigi niajn rilatojn kun la mastraro, tiel, ke niaj socialistoj aliĝis en la plej efikajn administrantojn de la kapitalismo kaj en la plej mirindan rimedon kontraŭ ajna revolucia revo. Sed la unu sola guto, kiu plenigis la glason, estis sendube ilia sinteno okaze de la referendumo pri nia aparteno al NATO. Kiel ili jonglis per argumentoj jene resumeblaj: kiam ni diris "ne", fakte, ni intencis diri "jes"! Kaj ni, hispanaj laboristoj jam modernigitaj, eŭropecaj, lasante nin ĉerboŝtopi, ne kapablis taksi la amplekson de tiu unika ŝanĝo kontraŭstari la dividon de la popoloj en du armitajn blokojn, kaj ni donis nian jeson al niaj regantoj, por ke ili integri nin al la NATO kun aliaj Okcident-eŭropaj landoj.

Num ĉe ni regas feliĉo. Ne, ni jam ne iras en ŝuaĉoj al la laborejo, sed en plej lastmodaj vestoj kaj, multaj, per belaj aŭtosciaj aŭtomobiloj, parkeblaj nur post milo da ruzaĵoj. La novaj teknologioj, kiuj en egaleca socio liberigus nin de pezaj taskoj

kaj disponigus al ni multe pli da tempo por kulturado de la spiri-  
to, en nia nuna socio aŭ superbazaro, kie oni vendas eĉ la propran  
unimon, ne nur prezentas nian glavon de Damoklo rilate maldungitecon  
kaj senlaborecon, ne nur liveras al la ŝtatoj la eulon komputori eĉ  
pri tio, kion da fojoj ni amorus ŝirmonate, sed ankaŭ polvas niajn  
riverojn kaj aeron, pereigas niajn fiŝojn, niajn birdojn... Televi-  
zie oni indikas al ni, kiajn vestojn ni sermetu por brili super niaj  
amikoj, kiaj detergentoj donas laktoblankan helon al niaj ŝemizoj,  
kaj, pere de oscedigaj ŝablonaj filmoj, oni montras al ni, ke en  
Usono oni vivas kiel kuko en butero...

Kiel feliĉaj ni estas! Tiam, ke ni ploras, ploradas  
de...feliĉo. Versajne pro ĉiuj ĉi atingoj la vorto revolucia esti-  
gas kaskadon da ridegoj en niaj asenbleoj, kaj niaj sindikatoj ka-  
pablas mobilizi nin nur pro monaj depostuloj.

Ne, ni jam ne iras en ŝuaĉoj al la laborejo, sed nul-  
taj el ni, frenezuloj: esperantistoj, verduloj, sennaĉiistoj, anar-  
ĥiistoj, komunistoj, socialistoj kaj poetoj, abomenas niajn novajn  
ŝuojn.

Miguel Fernández Martín

---

Pri kuraĉistoj.-

Malsanulo: -Do, kion mi devas fari, doktoro?-

Doktoro : -Testamenti-


...-... ..-.. ...-...

Bestkuraĉisto: -Sinjorino, vi maltrafis, mi  
nur estas bestkuraĉisto. Kiu adresis vin al mi?-

Pacientino: -Mia bofilo, sinjoro-

...-... ..-.. ...-...

Kuraĉisto esploris artritismen ĉe maljunulino, kiu ekploris. Rigar-  
dante ŝiajn abundajn larmojn, la doktoro diris flegne: -Sinjorino,  
ne ploru! Mi jam diris tre ofte, ke la malsekeco malutilas al vi!



Organizita de H.A.L.E. komencis kurso de Esperanto dum la pasinta Oktobro, en la sidejo de la sindikato C.N.T.-A.I.T. de Zaragozo, gvidata de kompetenta junulo k-do Antonio Valen.

Kontentiga la nombro da lernantoj kaj promesplena la futuro de la kurso, unue ĉar ĝi konsistas grandparte pri junuloj, kaj ĉe-  
tere ĉar ili projektas fondi esperantistan fakon en la sino de tiel grava sindikato.



Kuragigaj leteroj el eksterlandaj k-doĵ adresitaj al la menciita sindikato, Av. San José, 144-146.-E-50008-Zaragoza.-Hispanio, estos bonvenaj kaj dezirindaj.

...-... ..-...

Ankaŭ en sama urbo kaj organizitaj de la Centro "Fratego" de Zaragozo, komencis du kursoj de Esperanto, unu en la propra sidejo de la veterana Societo gvidata de Miguel Angel Martin, kaj alia en la "Instituto de Idiomoj" de la Zaragoza Universitato, lerte gvidata de D-ro José Olavide.

Ni deziras sukceson al ĉiuj ili!

...-... ..-... ..-...

Nia ŝatata amiko Ramón Manau Torres, c/Montseny, 5 piso, 08208 SABADELL (Barcelona), SAT-Pensanto en Hispanio, anoncas la abonajn kaj kotizojn por la jaro 1989:

Plenkotiza SAT-aneĉo kun "Sennaciulo",	prezas.....	1.800	ptojn.
Sama kotizo, nur valida por emeritoj,	"	1.350	"
Sama kotizo, junuloj ĝis 25-jara aĝo,	"	900	"
Hora abono al "Sennaciulo",	.....	1.350	"

### SAT-Abonoj kaj kotizoj...

Nura abono al "Sennacia Revuo", prezas . . . . . 400,-Ptojn

Membreco al H.A.L.E. por SAT-anoj, kun gazeto . . . . 300,- "

" " " por ne SAT-anoj, " " . . . . 600,- "

Sendu pagojn al la indikita adreso de la SAT-Peranto.

...-...

...-...

...-...

### Malagraba novaĵo.-

Kun bedaŭro ni sciis pri la subita malsano de nia bona amiko kaj tre estimata Profesoro D.Juan Régulo Pérez, loĝanta en La Laguna, Kanariaj Insuloj.

Infarkto lezis lian vidkapablon, tiel grave, ke nur malfacile li povas legi. Versajne, la malsano estas neinvertigebla, t.e. li neniam plu rehavos sian antaŭan vidkapablon, kvankam la kuracistoj asertis, ke li post iom da tempo povos repreni la antaŭan aktivaĵon, kompreneblas ke kun certa malfacilo.

Feliĉe, ĉiuj liaj ceteraj kapabloj restis netusitaj, sekve ni esperas, ke tre baldaŭ li povos denove labori, tiel brile kiel antaŭe.

Tutkore ni deziras al la bona amiko kaj elstara esperantisto, rapidan kaj kompletan resaniĝon!

...-...

...-...

...-...

### Kunveno en la sidejo de "Madrida Esperanto-Liceo"(MEL)

La 22an de Oktobro, de la 10a ĝis la 8a vespere, esperantistoj el diversaj hispanaj regionoj okazigis en la sidejo de M.E.L. kunvenon, en kiu oni analizis la krizan situacion trapasatan de la hispana E-movado. Kvankam la nunaj momentoj malfacilas, ne mankas entuziasmaj homoj, pretaj laŭiri novajn vojojn, krei freŝaerajn trablovojn ene de Hispana Esperanto-Federacio (HEF).

Sur ĉi angulo de nia gazeto, regule rezervita por rezencoj de libroj kaj broŝuroj, ni aperigas hodiaŭ rezencojn pri verkoj de hispanaj SAT-anoj antaŭ nelonge publikigitaj. Jen kelkaj el ili:

LA HOMA VIVAVENTURO, originale verkita de k-do Giordano Moya Escayola. Eldonita en 1987 de Barcelona E-Centro.-Str.Carreras Candi 36. 08028- Barcelona (Hispanio).

La tragika hispana travivaĵo, sekvata de la tutmonda milito kune kun la elfalo de la moralaj valoroj, instigis la aŭtoron serĉi filozofion, kiu, en la formuladon de humaneca etiko, enkonsideru la grandecon de la homa rolo en la evoluado de la naturo. La verko celas formuli novan humanecan etikon, novan ekonomikan ordon, kaj estigi, per la farto de la esperantismo, novan civilizacion.

Sendube, libro destinita al kleraj meditemaj homoj.

SANGA NUPTO kaj LA DOMO DE BERNARDA ALBA, originale verkita de Federico Garcia Lorca, laŭ traduko de k-do Miguel Fernández. Eldonita de Madrida Esperanto-Liceo, en 1987, str. Atocha, 98.-4<sup>a</sup>.- 28012-Madrid (Hispanio).

Temas pri du el la plej signifaj teatraĵoj de la mondfama hispana dramaturgo kaj poeto, fidele transponitaj surbaze de severa observado de la Lorca-aj versoritmoj kaj poezia universo, en kiun abundaj diversfontaj notoj helpas la leganton enprofundiĝi. En ambaŭ teatraĵoj, viroj kaj virinoj, ne agas kiel individuoj, sed kiel arketipoj de pasioj, sentoj kaj humanaj situacioj ekstertempaj, impulsa-

taj de nebremseblaj primaraj fortoj ekster ĉia rezonado kaj intelektismo, kaj envolvitaj en ancestra fatalismo. La protagonistoj de tiuj dramoj havas kiel literaturaj antecedentoj la puran klasikan tragedion. Tre bona kaj fidela la traduko de k-do Fernández.





ANALOJ DE LA ESPERANTA MOVADO IN HISPANUJO, verkita de k-do Antonio Marco Botella. Mendebla ĉe "FratoCo", str. San Vicente de Paul, 1.-E 50001-Zaragoza (Hispanio).

La sola fakto, ke nur unu jaron post la apero de ĉi duvo-  
luma verko oni devis publikigi ties duan eldonon, sufiĉe elokventas  
rilate la grandan sukceson de ĉi monumenta kroniko pri nia Cent-  
jara vivo. La aŭtoro prezentas al la leganto, en laŭtema kronolo-  
gia tabelo, detalan priskribon de la hispana E-movado, kolektis  
plej gravajn eventojn, poemojn, konfliktojn, esperojn, kuriozaĵojn  
kaj atingojn, kaj survoje komentas ilin respektive kaj prudente.  
La rezulto de tiu, sendube peniga multhora laboro, estas tiu duvo-  
luma verko, esenca por konatiĝi kun la hispana E-movado.

MIGUEL HERNANDEZ, POETO DE L' POPOLO. - Antologio de Hernández-aj  
poemoj elektitaj kaj transponitaj de k-do Miguel Fernández Martín.  
Eldonita de Grupo Esperanto Valencia, en 1988, Gran Via Fernando  
el Católico, 45.-3ª.- 46008-Valencia. (Hispanio).

En tiu ĉi Esperantlingva antologio de la  
plej gravaj poemoj de Miguel Hernández,  
unu el la zenitaj figuroj de la nuna his-  
pana liriko, enkarcerigita de la Franko-a  
reĝimo kaj mortinta en la prizono de Ali-  
cante en 1942, la leganto trovos, krom po  
unu detala komentario antaŭ ĉiu el liaj  
libroj aŭ poemkolektoj, biografian resu-  
mon kaj notojn, nenalhaveblajn por ĝuste  
loki la poeton en ties pasia epoko.



Jen du el la poemoj  
de la libro:



## CITRONO

Ho citrono tute flava,  
la patri' de mia febro!  
Se mi lasos  
vin flirtadi,  
ho citron'  
tute flava!,  
al mi donos  
vi resume  
fulmo-brilon.

Se mi metos  
vin sur pinton  
montro-fingran,  
ho citron'  
tute flava!,  
al mi donos  
vi ĉineton  
kun har-ligo,  
eĉ la tutan  
Ĉinion,  
kvankam de sur  
la anĝeloj  
rigardata.

Se mi kaptos  
vin perdente,  
al mi donos,  
ho amiko  
kun amar'!,  
vi minuton  
da mar'.

## MADRIDO

Inter la kverkoj, la fagoj, la ŝtonoj,  
la foliar' kun leĝera ostaro  
ŝprucas de ŝtalo sensvena la sonoj:  
ŝprucas la ŝtalo.

Urbo zorganta la brizan kvieton  
spertas de fiaj pasioj la mordojn,  
ovras la pordojn sam-kiel rideton:  
fermas la pordojn.

Verda avid' intermure, en fumo,  
ardas kun oraj malamo kaj sombro.  
Sian retaron jam sternis la lumo  
kontraŭ la ombro.

Fajro ne bridos ĉi urbon en streĉo,  
vane rankor' laŭro-haken sin tiras,  
kaj ĉi lavendo, ĉi rozo en peĉo  
ĝojon elspiras.

Pordo fermita, drinkejo gaj-stata:  
ne enŝloseblas karcere likvoroj.  
Jen, trapikita de vivo malsata,  
urbo de floroj.



La korno-vundo kaj la morto.- (1)

LIRIKAJ PAĜOJ

Je la kvina posttagmeze. (2)  
Estis ĝuste la kvina posttagmeze.  
Knabet' alportis la blankan littakon (3)  
je la kvina posttagmeze.  
Kalka korbo atendis antaŭvide (4)  
je la kvina posttagmeze.  
La Ceter' estis morto, mure morto  
je la kvina posttagmeze.



F. García Lorca

La vento foren portis la kotonojn  
je la kvina posttagmeze.  
Nikel' kaj vitro per oksid' sematas (5)  
je la kvina posttagmeze.  
Kolombo luktas kontraŭ leopardo  
je la kvina posttagmeze.  
Femuro kontraŭ korno angorplena  
je la kvina posttagmeze.  
Komenĉiĝis la sonoj de l' borduno (6)  
je la kvina posttagmeze.  
L' arsenika kloŝaro kaj la fumo (7)  
je la kvina posttagmeze.  
Ĉestratangle svarmas silentgrupoj  
je la kvina posttagmeze.  
La taŭro solas kun la koro supre! (8)  
je la kvina posttagmeze.  
Kiam la neĝa ŝvito ekaperis (9)  
je la kvina posttagmeze,  
kiam kovriĝis la aren' per jodo  
je la kvina posttagmeze.  
La mort' ellasis ovojn en la vundon (10)  
je la kvina posttagmeze.  
Je la kvina posttagmeze.  
Je la, ekzakte, kvina posttagmeze.

Ĉerko kun radoj iĝis lia lito (11)  
je la kvina posttagmeze.  
Ostoj kaj flutoj tintas enorele  
je la kvina posttagmeze.  
La taŭro muĝis jam sub lia frunto  
je la kvina posttagmeze.  
La ĉambren ekirizis l' agonio  
je la kvina posttagmeze.  
Sur la foro jam venas la gangreno  
je la kvina posttagmeze.  
Antro lilia sub l'ingvenoj verdaj  
je la kvina posttagmeze.  
Liaj vundoj bruligis kiel sunoj  
je la kvina posttagmeze.  
Kaj la amaso rompis la fenestrojn  
je la kvina posttagmeze.

Ve, la terura kvina posttagmeze!  
Batis la kvinan ĉiuj mond-horloĝoj.  
Estis la sombra kvina posttagmeze.

## NOTOJ:

(1) Temas pri la unua el la kvar poemoj, el kiuj konsistas la impona kaj genia "Funebra kanto por Ignacio Sánchez Mejías", unu el la plej eksterordinaraj tiuspecaj lirikaĵoj en la hispana lingvo. Rimarkindas en ĝi la kunestado de delonustilaboĵ (klara tendenco) kaj oksilaboĵ (la plej popularaj hispanaj versoj) blanke rimiĝantaj, la aparte belefektaj karaĉaj vortfiguroj surrealisteme esprimitaj, sed baziĝantaj sur plej pura realo, kaj la fakto, ke tute akcesora elemento ("la kvina posttagmeze") turniĝas en unu aranĝon, fundamentan poezieron, kies alterna ripetado faras la poemon mirinde litanieca, kiel konvenas al funebra kanto.

Ignacio Sánchez Mejías estis unu el la plej grandaj ĉi-jarcentaj toreistoj, klera homo tiel inklina al la taŭroludado kiel al la literaturo, intima amiko de Federico García Lorca, Rafael Alberti kaj, ĝenerale, de ĉiuj poetoj de la renoma "Generacio de '27" kaj aŭtoro de interesaj teatraĵoj. Kornovundite la 11an de Aŭgusto 1934 en la taŭroludejo de Manzanares, li mortis en Madrido du tagojn poste.

(2) Je tioma horo komenĉiĝas la taŭroludaj spektakloj.

(3) Per tiu blanka littuko oni kovros la senvivan korpon de la toreisto, kies morto fatalas. (Fakte nur la fatalo aŭ la hazardo kondukis lin al la taŭroludejo de Manzanares kiel anstataŭanto de Domingo Ortega).

(4) Jen ree la fatalo superŝvebas la matadoron. Oni kutime surjetas kalkon sur la sangoflakojn kuŝantajn sur la areno.

(5) Tio neoksidebla oksidiĝas, tio neputrema putras...

(6) Nur la sonoj de la borduno, la plej bassonora kordo de la gitaro, preludoj al la plej animska "flamenka kanto", nome la "siguiriya" (sigirija), povas esprimi la dramon.

(7) Halucinite, la poeto imagus kosmarecajn operaciejon, anesteziojn kondukantajn al la morto.

- (8) Venkinte la homon, jen la bosto aperas fierplena.
- (9) Ignacio, sensanĝa, aspektis morte pala, kiam la "neĝa avito ekaperis" kaj la toreisto de lia taĉmento, post, kiam oni aplikis suprajn malinfekton ("kovriĝis la aŭren' per jodo), enambulanĝigis lin, plenumante liajn dezirojn esti transportata al Madrido.
- (10) La ambulanco paneis survoje. Oni devis atendi la anstataŭajn peĉojn. Necesis ŝanĝi la bandajon de la vundito, dum terura varmo pliigis la riskon de infekto.
- (11) Lia sufero, lia batalo kontraŭ la morto tiel violentas, ke, laŭdire, alkreĝiginte al la litkapaj kaprostangoj, li skuas la liton, kiu ruliĝas tra la ĉambro.

Trad. kaj komentoj de Miguel Fernández

## Pioniroj

EMILIO ARTIGAS Y ERIGO.-

Aragona instruisto, fervora kaj laborema esperantisto, unu el la plej kompetentaj sub lingva vidpunkto en Hispanio. Li esperantistiĝis en 1907, kaj en 1908 kunfondis la Esperantan Societon "Fraterco" de Zaragozo, kies unua Sekretario li estis unanime elektita.

Freskaŭ senhalte dum multaj jaroj, li gvidis E-kursojn al unu post alia generacio en la indikita E-rondo, inkluzive en la Zaragoza Universitato ankaŭ li oficiale gvidis E-kursojn.

Kiel liberpensanto li instruis profesie al laboristoj en la Racionalismaj Lernejoj dependantaj de la sindikatoj, kaj longe instruis ankaŭ en la prestiĝaj Lernejoj pri Libera Instruado.

Granda idealisto lojala al la SAT-principoj, li sindone laboris sen bombastaj elmontroj, tute modestoĉe, ĝis 1953, kiam li forpasis.

# Dokumentoj el pasinto

## Pripensinda dokumento.-

Ĝi-malrapre, ni fotokopias nian dokumenton pri la Laborista Internacia Movado, presita en 1920. Hiel niaj legantoj sendube konstatos, la celoj de la Laborista Movado apenaŭ ŝanĝis, internacie ni fakte progresis preskaŭ nenion. Kontraŭe, la kapitalismo aktualiĝis, sin prezentas eksternacie sub la formo de multinaciaj entreprenoj, tiel efike, ke ĝi jam regas la mondon, ĉu ni ankoraŭ daŭrigos dividitajn, kaŝitajn en tiuj celoj nomataj nacioj?

Kamarado: pripensu kaj reagu energie kaj tuj!

Majo 1920.

## Kamaradoj el ĉiuj landoj!

Ĉi apude ni prezentas al vi la novajn statutojn de Liberiga Stelo, ŝanĝitajn laŭ datfreŝa referendumo de la nuna anaro.

. Sajnas al ni superflue montri ĉi tie, la necescon de tia Laborista Internacio. Certe, ĉiuj antaŭenemaj Esperantistoj, sentas la bezonon de tiu organizaĵo, kiu pli ol io ajn helpos al la triumfo de nia kara Idealo. Tamen, unu punkto el tiuj statutoj postulas klarigon. Liberiga Stelo fundamente malsimilas je la ĝisnunaj Internacioj. Ĉiuj Laboristaj Internacioj, estintaj kaj estantaj, pekas en sia strukturo mem: ĉiuj staras sur mallogika bazo, nome: la nacio kiel celo. La nepra naciemismo de ĉiu nacia sekcio venenas la tutan asocion. Ĉiu sekcio penas — eble senkonscie — nur por si mem, nur por sia egoista naciemismo. Ho! evidente! sur la papero, la konkordo estas ..., kaj ĉe la kongresoj, ĉiuj sekcioj reciproke ĵuras certan interhelpon. Tamen, dum la akraj krizoj, tiu unueco, tiu samceleco malaperas kaj, spite la penegoj de kelkaj fideluloj, cedas lokon al naciemismo, eĉ al ŝovinisma fluego kiu puŝas la hieraŭajn amikojn unu kontraŭ alian! Tiam, ne plu da interhelpo, ne plu da frateco, sed malfidemo eĉ malamo. Fakte, la laborista Internacio ne ekzistas: ĉiu nacia sekcio estas aparta, aŭtonomia asocio, Ja! ĉe iu ajn Internacio, pro la lingvodiverseco, preskaŭ devigaj estas la sekcioj, almenaŭ lingvaj sekcioj ..., sed ni, Samlingvanoj, ni Esperantistoj, ni ne konas tiun baron. Kial, konservi tiun formisistemon, kiu sin montris tiel fatala ĉe ĉiuj laboristaj internaciaj institucioj. Forpuŝu tiun antikvan kaj dangeran koncepton kiu sufokas la internacisman senton mem. Ni povas kaj devas fondi sennaciécian Internacion. Al naciemismo opuzu ni integralan Internacismon.

Ĉiuj komunistoj, kooperativanoj, liberecanoj, sindikatanoj, socialistoj el ĉiuj landoj, ĉiuj kiuj kvankam envicigintaj diferencajn partiojn, aliras al sama celo, nome: la estriĝo, la memstareco de la Laboristaro, ĉiuj unuigu, kunigu en nur unu Supernacia Internacio. Forĵetu ĉi tiujn etiketojn kiuj nin dividas kaj ĝenas, kaj ilin anstataŭigu per la devizo: Revolucio.

Kamaradoj! diskonigu, presigu nian alvokon, anigu, anigu L. S. Ni bezonas ĉies fortojn. Se ĉiuj antaŭenemuloj komprenas sian devon, nia Internacio estos potenca, kaj sin trudos al la Labor-klaso, kaj tie estigos la veran Internacismon kiu tiom mankas.

Nia agadkampo kaj patrujo estu: Homaro.

Nia celo estu: helpi al la starigo de la Universala Respubliko Laborista.

Frate al vi:

LA CENTRA KOMITATO DE L. S.

**Kajeroj** —  
— **el la Sudo**



**IMPRESOS**

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Redakcio : str. Av. Compromiso de Caspe, 26-15  
50001 - Zaragoza, (Hispania)

Deposito Legal Z-2398-88

Presejo, Aragonesa de Reproducciones Graficas SA